

N. N. 32, Burĝonis rozarbedo	N. N. 32, Elkreskis roz-branĉeto	N. N. 32, A spotless roze is growing	N. N. 32, Jen ĉiamviva Rozo	N. N. 32, Rozbranĉo forĝermadis
<i>tradukita de Guido Holz</i>	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de N. N. 33</i>	<i>tradukita de Leland Bryant Ross</i>	<i>tradukita de Felix Ney</i>
1. Burĝonis roz-arbedo el delikata sin' laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro-tempo je noktomeza hor'.	1. Elkreskis rozbranĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto meze en vintra nokto laŭ diro de profet'.	1. A Spotless Rose is growing, Sprung from a tender root, Of ancient seers' foreshowing, Of Jesse promised fruit; Its fairest bud unfolds to light Amid the cold, cold winter, And in the dark midnight.	Jen ĉiamviva Rozo laŭ vorto de profet' El la Jiŝaja ŝoso ekkreskis kun impet'. Ĝi venis, hela Flor', en frida tempo vintra Je noktomeza hor'.	Rozbranĉo forĝermadis el trunk' de nobelec'. Prauloj jam kantadis: de Jiŝaj ĝia spec'. Floreto portis ĝi, en akra vintro estis, Je horo de noktmez'.
2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbed', elvenis flor' benata laŭ diro de profet'. Laŭ sankta Di-ordon' ŝi naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon por tuta mond' konsol'.	2. The Rose which I am singing, Whereof Isaiah said, Is from its sweet root springing In Mary, purest Maid; Through God's great love and might The Blessed Babe she bare us In a cold, cold winter's night.	Jesaja ĝin anoncis, la menciita Flor'; Maria ĝin responsis el patrin-ama kor'. Ŝi naskis Rozon por klarigi Dian amon Je noktomeza hor'.	La branĉo anoncita Jesaja de profet': Maria netuŝita, de kiu la floreto. Eterne volis Di': naskinta infaneton Plej pura restis ŝi.
3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto savas; Li, hom' kaj Di' en ver'.	3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.		Ĉi tiu milda Floro per sia dolĉ-arom' Heligas per Digloro la vojon de la hom'. Ja homo, tamen Di', ĝi ŝarĝojn malpezigas Kaj homojn savas ĝi.	De tiu eta floro alvenas bonodor' Ĝi brilas en la koro, mallumon pelas for. Homido, Dia Vort', nin el sufero helpas, De pek' Savant' kaj mort'.
...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranca1.html>.